



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

7-8

Julio-aŭgusto 2025 Kol. 480/41

XX

Enhavo : Julio - Aŭgusto, La 76-a IFK en Žilina, Familiaj valoroj laŭ UN, Esperanto en la Viena Universitato, 53-a Internacia Infana – adoleskanta Kongreseto, La franca somero greziljone, Defende pri Artefarita Intelektio (AI), Balkane kaj Danube, Protekti nian heredaĵon, Esperanto por mi.

XX

Julio

La sankta ombro garda viglas super nia hejmo,
aŭdiĝis ĝia voĉo en silento: Ne forgesu!
Kaj en susuro de folioj, en malvarma akvokanto
aŭdiĝas ĝia voĉo, la akompananto: Ne forgesu!

En ĉeĥa lando akompani vin ne ĉesu la ago kun vireca vorto,
nur via kredo, ardo, ne la ŝtiparfajro.
Ne bengalfajro trompa,
nur silenta daŭra flamo
brulu en la animoj.

La sankta ombro garda viglas
super ĉeĥa lando
kaj la infanojn en luliloj sanktigas
per aera kiso.



Aŭgusto

Ĝardenon por la mond' fermitan
spika susuro blovas kaj odoras per la nutra pano.
Rikolta paca kanto iras tra la kampoj
kaj sub la arda suno feliĉan ŝviton viŝas homo.

De malproksimo aŭdas mi pordegojn de grenejoj,
kvazaŭ la dentoj grincus.
Neobservebla raba mano apogis
sin sur pajl-tegolo, atendas.

Kaj tamen estas mi silenta
kaj senkria.
Super ni klinas siajn kapojn
maldormante sunfloroj, la
horloĝoj de soleco nia.

Karel Toman – Monatoj,
en E-on tradukis J. Mráz,
bildoj de Z. Pospíšilová.



La 76-a IFK en Žilina

De la 30-a de aprilo ĝis la 5-a de majo 2025 okazis en Žilina la 76-a Internacia Fervojista Esperanta Kongreso. Ĝi okazis sub la aŭspicio de Jozef Ráž, la ministro de transporto de la Slovaka Respubliko, kaj de Peter Fiabáne, la urbestro de Žilina. Partoprenis ĝin 90 personoj el 15 landoj, ne nur fervojistoj, sed ankaŭ fervojamikoj.

Merkredon la kongresanoj, urbaj civitanoj kaj reprezentantoj de la Universitato de Žilina ĉeestis la malfermon de la ekspozicio "La Plej Belaj Turismaj Fervojaj Itineroj de Slovakio kaj Pollando" en la Regiona Biblioteko en Žilina. Partoprenis ĝin ankaŭ sinjoro Andrzej Walczyk el la Asocio por subteno de sporto, turismo kaj kulturo 'Kolejarz', la iniciatinto de la fotokonkurso. La tuta evento estis bela ekzemplo de translima kunlaboro.

En la urbo mem la interesigantoj povis sekvi ekstarigon de maja arbo akompanatan per la prezentaĵo de la infana folkloro ensemblo *Cipovička*, kaj la armean paradon organizitan de la urbo okaze je la 80-a datreveno de la urb-liberigo fare de la Ruĝa Armeo.

Okazis jenaj kongresaj eventoj:

- Dum la ĵaŭda solena malfermo s-anino Rodica Todor, la prezidantino de IFEF, pro sia fidele 15-jara prezidanteca oficperiodo ricevis la titolon „Honora Prezidanto de IFEF“. En la dua parto, la kongresajn partoprenantojn salutis reprezentantoj de unuopaj IFEF-asocioj kaj gastoj.
- Kunsido de la Faka Komitato estis kompletigita per la ĉefa kongresa prelego titolita „Mediaj Problemoj de Socia Disvolviĝo“, sekvaj fakaj prelegetoj kaj bloko „El fervoja mondo“.
- Dum la sabata ĝenerala asembleo, krom aprobo de diversaj raportoj, okazis ankaŭ elektoj de nova estraro. La nova prezidantino fariĝis s-anino Andrea Švubová el Ĉeĥio. En la IFEF-estraro restis ĝiaj ĝisnunaj anoj Vito Tornilo (sekretario), Laurent Vignaud (kasisto), kaj Ladislav Kovář (redaktoro de Internacia Fervojisto).
- Sabaton vespere okazis prezento de la loko por la venontjara kongreso; ĉi tiu okazos en Mokra Gora, Serbio.

Aldone al fervojaj agadoj, la kongreso alportis al partoprenantoj la jenajn turismajn aranĝojn:

- Merkreda vespera prelego konatigis la partoprenantojn kun la urba raraĵo, kion signifas la numeroj, kiuj troveblas sur la muroj de balustrado.
- La sekvan tagon parto de la kongresanoj partoprenis ĉiĉerone gvidatan piedekskurson tra la urbo kaj la alia parto grimpis sur la ĉeurban montopinton Dubeň por ĝui regionan kaj urban panoramojn de sur la elrigardturo.
- Dum la vendreda ekskurso al la kastelo Budatín oni aparte admiris la ekspozicion pri dratumado.
- Duontaga sabata ekskurso gvidis al la pitoreska vilaĝo Čičmany, kie la partoprenantojn mirigis la ornamado de lignaj domoj kaj bunteco de popolaj kostumoj.
- La dimanĉa tuttaga ekskurso kondukis siajn interesiĝantojn per la elektra trajno TREŽ al la banloko Trenčianske Teplice. Sekve la posttagmeza rapidtrajno veturigis ilin al Bratislava, kaj tie ili vizitis la Muzeon de Transporto. Niaj rumanaj kolegoj vespere eĉ sukcesis baloti ĉe sia ambasadejo.
- London la partoprenantoj de la postkongresa resto konatiĝis kun Bratislava per la trajno *Prešporáčik* kaj laŭdis la tre bone parolatan akompanan gvidiston, kompreneble, en Esperanto. Post la tagmanĝo ili piedvizitis kelkajn urbajn



vidindaĵojn kaj fotis sin ankaŭ ĉe la konata statuo *Čumil* (Gapanto).

La vesperaj programoj ne mankis:

- Dum la merkreda bonveniga vespero la malnovaj konatoj salutis unu la alian kaj ankaŭ la novaj partoprenantoj trovis sian lokon en la amikeca rondo.
- Ĵaŭdon, la polo Georgo Handzlik prezentis siajn aŭtorecajn kantojn (inkluzive de tradukoj de kantoj de Jaromír Nohavica) kaj la serbo Saša Pilipović kantis ciganajn melodiojn. Krome, ili komune prezentis eltiraĵojn el la teatraĵo preparata por la julia Universala Kongreso okazonta en Brno.
- Vendredon Majka Minichová el la bratislava virina grupo EvaBand kantis bukedon de slovakaj popolkantoj kaj instruis la partoprenantojn kanti la popularan kanton *Dancu, dancu* en la slovakaj.
- La sabata vespero estis dediĉita al gustumado de slovakaj vinoj kaj de grandega torto el la loka bakejo *Zákusko* (Kukejo), ornamita per E-simboloj.

Ekologia starpunkto estis aplikata – subskribitaj paperaj aŭ keramikaj tasoj por kafo kaj trinkaĵoj "parkis" surtable por esti reuzeblaj.

Laŭ la ĝisnunaj reagoj, la partoprenantoj ĝuis la kongreson, kio *ĝojigas min, invitantinon nome de la Slovakia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj, SAFE, kaj ankaŭ la membrojn de la organizaĵo Edukado ĉe Interreto E@I*, kiuj praktike organizis la kongreson; multaj partoprenantoj aparte laŭdis ilian modernan organizan laboron, kiu estas inda de la 21a jarcento.

Magdaléna Fejfičová (Fejfi) 2025 05 17

Sian dankon kaj kelkajn aldonojn jen esprimas J. Drahotová kaj M. Turková, kiuj estis gastoj de la kongreso.

Familiaj valoroj laŭ UN

La temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Familioj estas *Familio-celaj politikoj por daŭripova evoluigo*. Per tiu temo, Unuiĝintaj Nacioj instigas registarojn de la mondo integri familiojn en siajn evoluigajn tagordojn por trakti gravajn temojn, kiel estas ekzemple teknologia transformado, demografiaj ŝanĝoj, urbigo, migrado kaj klimata ŝanĝiĝo. Ĝenerale, familioj transdonadas valorojn al novaj generacioj. Tiel ni bezonas ke la familioj transdonu la valorojn kiel: socia justeco, daŭripovoneco, natura konservado, klimata ekvilibro kaj aliaj gravaj elementoj por nia komuna estonteco. En sia eduka rolo familioj konservas kaj disvastigas lingvojn kaj inspir-proponadas ilin al siaj infanoj.

Fonto: Gazetara komuniko de UEA

Esperanto en la Viena Universitato

Informoj pri la celoj, enhavo kaj metodo de la kurso

Ĉi tiu kurso provizas enkondukon al esplorado pri lingvoinstruado kaj lernado kaj didaktiko de fremdlingvoj. **Jenaj temoj estos diskutitaj:** historio de esplorado pri lingvoinstruado kaj lernado kaj didaktiko de fremdlingvoj; teoriaj supozoj pri lingvoinstruado kaj lernado; metodikaj aliroj al lingvoinstruado kaj lernado; sciencaj konceptoj kaj esplormetodoj en esplorado pri lingvoinstruado kaj lernado kaj didaktiko de fremdlingvoj; esplorado pri dualingva akiro kaj esplorado pri plurlingveco; esplorado pri lingvoinstruado kaj lernado en Aŭstrio; elektitaj aspektoj kiel ekzemple disvolviĝo de dezajno por la scienca esploro de empiria demando, la influo de aĝo, lingvolernada motivado; kaj lastatempaj tendencoj kiel

ekzemple neformala lingvolernado en la kunteksto de la cifereca epoko.

Plej multaj homoj lernantaj Esperanton nuntempe havas inter 15 kaj 30 jarojn.

En la lastaj jaroj, pluraj milionoj da homoj lernis Esperanton, plejparte per Duolingo. Ĉi tiuj junuloj renkontiĝas ĉe junularaj konferencoj.



La tekston kaj la bildon sendis samideano Mag. Walter Klag, ĵurnalisto kaj eldonisto, fakdelegito de UEA por numismatiko, Vieno, Aŭstrio

53a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto

Tio okazos samtempe kun la UK en Brno, Ĉeĥio. La ĉi-jara temo estas “Ludo, esploro, aventuro“. Ni atendas ĉirkaŭ 40 infanojn kaj adoleskantojn, kiuj parolas Esperanton (minumume – scipovas baze esprimi siajn bezonojn kaj dezirojn en Esperanto). Infanoj kaj adoleskantoj ĝis-15-jaraj estas la kutimaj IIK-partoprenantoj. Adoleskantoj kaj fluparolantoj povas fariĝi helpantoj. Infanoj ĝis 7 jaroj kutime bezonas gepatron aŭ

prizorganton dum IIK. Pliaj informoj en la retejo <https://iik.uea.org/2025>

Fonto: Revuo Esperanto, majo, p. 111

La franca somero Greziljone

Jen la somera programo de Eo-kastelo Greziljono en Baugé-en-Anjou.

· julio-11 / 20: 11-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)

julio-21 / 31 : 46-a Renkonto de **Esperanto-Familioj** REF kaj 15-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj

· aŭgusto 09 / 16: 98-a Kongreso de SAT (**Sennacieca Asocio Tutmonda**)

Kontaktu nin por pli da informoj: kastelo (ĉe) gresillon.org - 06 51 24 24 23. Aliĝu en <https://gresillon.org/al?lang=eo> - eblas peti prezredukton.

Defende pri Artefarita Intelektto (AI)

Mi lastatempe uzis la artefaritan intelekton por transformi 11-paĝan anglalingvan intervjuon kun mi al la persa podkasto (la intervjuo estis farita en la angla por universitata tezo en Hispanio). La rezulto estas mirinda! Tuje, ĉi tiu AI produktis 24-minutan podkaston en la persa lingvo kun voĉoj de virina kaj vira prezentistoj, kies persaj prononco kaj tono estas nekredeble ĝustaj kaj naturaj. Kvankam estas kelkaj etaj eraroj en la podkasto, tamen la teknologio provizas grandan rimedon ankaŭ por tiuj, kiuj ne povas legi kial ajn, trovas legadon malfacila,

trovas malfacila komprenadon de kompleksaj tekstoj aŭ ne scias fremdajn lingvojn. Tial la senpaga rimedo estas grava paŝo direkte al edukaj egaleco kaj justeco. Ene de minutoj, la AI produktis 14-minutan podkaston en la angla lingvo bazitan sur la sama 11-paĝa intervjuo transskribaĵo.

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI.

El la EKO 2025-23

Balkane kaj Danube

La 17-an de majo okazis la monata kunsido de la Balkanaj kaj Danubaj landoj. Partoprenis esperantistoj el Bulgario, Bosnio kaj *Hercegovino*, Grekio, Rumanio kaj Serbio. Aurora Bute malfermis kaj enkondukis la kunsidon. Aranka Laslo rememorigis pri la Esperantaj kursoj en Serbio (novembro 2024 - majo 2025). Andreas prezentis belan materialon pri Esperanto-movado en Grekio, estontecaj laboro kaj kunlaboro.

Raia (Bulgario) prezentis la landajn kongresojn en Bulgario kaj Aŭstrio. Maje okazis Eo-kongreso en Hispanio, Kroatio, Bulgario, Aŭstrio, la fervojistoj kongresis en Slovakio, kaj sekvas BET en Litovio, Poliglota renkontiĝo okazis en Ĉeĥio, Krakovaj Tagoj, la franca, pola kaj itala kongresoj, UK en Ĉeĥio, ILEI-kongreso en Serbio, SAT-kongreso en Francio. Fine ni parolis pri ZEOj en nia regiono, la surdanuba insulo <https://esperantisto.hu/insulo-esperanto/>.

Ligilo por elŭti video-registraĵon de la kunveno estas: <https://1fichier.com/?9mfon0prjdfjgtjivy8t> . La venonta Balkan-

Danuba kunlabora kunsido okazos sabaton, la 21-an de junio 2026.

El la EKO 2025-23

Protekti nian heredaĵon

Rilate la arkivon de Prilep, kiun prizorgis Viktor Galeski en Makedonio Norda, mi vizitis s-inon Anita Galeska, la fratinon de Viktor, kiu tenas la kolekton en sia domo. Mia balkana vojaĝo okazis en januaro 2024. Dum la vizito mi konstatis, ke la kolekto en Prilep okupas 5-6 plenajn ĉambrojn, plejparte la materialo troviĝas en ŝrankoj, ordigita, sed estas ankaŭ granda neordigita parto. Grandparte temas pri libroj, amase pri stokoj de nevenditaj makedonaj eldonaĵoj, periodaĵoj, kaj gravaj paperaj dokumentoj kaj fotoj. Al Makedonio Norda mi estis veninta pro la invito de Anita Galeska, kiu volis donaci la kolekton al iu institucio. Ŝiaj provoj fari tion en Makedonio Norda ne donis rezulton, tial ŝi volis donaci la kolekton al Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Kroatio. Temas pri ampleksega materialo, pri kiu ne estas certe, ĉu ĝi ricevus permeson de ŝtataj institucioj por translokado eksterlanden, ĉar temas pri nacia kultura valoraĵo. Dum mia vizito mi havis eblon interparoli kun la konata kultura aganto Igor Tasevski (neesperantisto), kiu promesis kontaktiĝi kun biblioteko en Prilep por vidi, ĉu tamen oni trovus lokon por akcepti la kolekton. Malavantaĝo estas, ke s-ino Anita volas vendi la domon, tial la kolekto povus troviĝi en danĝero perei, se la domvendo vere okazos. Poste mi kelkajn fojojn demandis al Anita, ĉu estas progreso en la afero, sed ĉiam temis pri negativa respondo. Mi proponis, ke DEC skribu al la Kulturministerio de

Makedonio Norda kaj samtempe al la Nacia arkivo en Skopje, por ricevi ilian respondon rilate transportebilon al Kroatio, sed tio ne realiĝis, kvankam mi jam preparis la koncernajn dokumentojn. Mi esploris ĉe *Esperantic Studies Foundation*, ĉu ĝi pretus financi transportkostojn, se la decido pri translokado al Kroatio vere okazus. ESF pritraktus tiun temon, se ni klarigus la valoron de la kolekto kaj neceson de ĝia translokado. Konklude, la kolekto en Prilep troviĝas en la sama situacio, se ne eĉ pli danĝera, en kia troviĝas aliaj kolektoj, pri kiuj ne troveblas bona solvo ĉe la esperantistoj mem, sed ne en oficialaj ŝtataj arkivoj. Esperantaj kolektoj estas kompleksaj kolektoj de ĉiaspeca materialo pri Esperanto, kaj estas apenaŭ imageble, ke tian kolekton akceptus iu nacia arkivo, ĉar ĝi ne bezonas la tuton. Estus necese dispartigi tian kolekton al biblioteko, fototeko, dokumentarkivo ktp, kio estus perdo por la movado kaj pereigo de la kolekto kiel tutaĵo.

Josip Pleadin, Kroatio, El la EKO 2025-23

Esperanto por mi



16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner

Redaktanto HORI Jasuo, Japanio, faris jam 8 librojn de krajona portretistino Helga Plötner kaj li nuntempe laboras pri la naŭa. Ĉiu volumo enhavas portretojn de 16 homoj, duone viroj kaj duone virinoj kaj eseon, kiun ĉiu verkis, temantan pri "Mi kaj Esperanto". En ok volumoj, entute aperis 128 esperantistoj el la tuta mondo

kiel "Biografio de esperantistoj en la 2020-aj jaroj". La

eldonado estis tiel alte taksita, ke Helga estis premiita de UEA pro sia "elstara agado" antaŭ du jaroj.

Ĉi tiu 8-a volumo prezentas homojn el Kroatio, Koreio, Japanio, Bulgario, Germanio, Brazilo, Meksiko, Tanzanio, Porto-Riko, Albanio kaj Pollando.

Jen la parto de la antaŭparolo verkita de Helga por ĉi tiu volumo:

Mi, nun 80-jara handikapulino kun kronikaj doloroj kaj problemegoj, sukcesis portreti kun kuraĝa, forta volo ankaŭ por tiu ĉi 8-a libro en bonfido, kredo, amo, espero kaj ĝojo. Esperanto venku iam tutmonde por ke unu komprenu la alian en bona etoso! Estu nepre PACO, PACO, PACO tutmonde! Helga Laŭ informoj, la volumoj 1 ĝis 3 estas elĉerpitaj, sed ankoraŭ haveblas ekzempleroj de la postaj volumoj. Ili estas malmultekostaj, po 5 eŭroj. Ankaŭ estas ŝia alia libro "Mia pentrista vivo – Por Esperanto kaj por Paco" (15 eŭroj). Por mendi, kontaktu la Libroservon de UEA :

libroservo@co.uea.org aŭ la libroj certe estos aĉeteblaj dum la UK en Brno. La redakcio

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: ahh@esperanto-ahh.eu interreto: www.esperanto-ahh.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.